Kiam mi restas sola

Vortoj kaj muziko de
Ĵomart Amzeev

Kiam mi restas sola
Kiam neniu min vidas
Kun vi mi interparolas
Al vi mi pense rapidas.

Kiam delonge estas
Mi sen viaj leteroj
Malamas mi poŝtkeston
Malbonas miaj aferoj.

Rf - I: Kiam forgesas mi sonon
de voĉo mallaûta via.
Mi kantas malnovajn kantojn
Kiujn kantis ni iam.
Mi kantas malnovajn kantojn
Kiujn kantis ni iam.

Se mi vian forgesos vizaĝon,
se iam okazos tio.
Do nepre mi devos vojaĝi
eĉ Dio ne scias ĝis kiam.
Denove mi devos vojĝi
Ĉis kiam, ĝis kiam, ĝis kiam.

Rf - I: